* (Kultura E-Domo, adreso supre; gvidas Ewa Bondar)
- 23-02: **Nacia jamboreo de germanaj skoltaj** kun e-ista partopreno, Friedeburg, Germanio (Martin Bähr, Ladenbeker Furtweg 256, DE-W-2050 Hamburg 80; tel. +49/40/738-51-46)
- 24-25: **La etna defend-agado de Edmond Privat**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Tomasz Chmielik)
- 24-31: **78-a Universala Kongreso de Esperanto**, Valencio, Hispanio (CO de UEA, adreso revu-komence)
- 27-31: **E-feriado por familioj**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Blazio Vaha)

aŭgusto

- 01-07: **27-a Konferenco de ILEI kaj 2-a ILEI-gimnazio**, Paterna (Valencio), Hispanio (Stefan MacGill, Esó u. 7. III, HU-1034 Hungario)
- 01-14: **Somera E-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥio (Esperanto, CS-67401 Třebíč)
- 03-07: **La idealo de Zamenhof**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas François Degoul)
- 03-07: **Esperantistoj: ĉu kvazaŭ etno?**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Aleksandr Melnikov)
- 03-08: **Informado kaj publikaj rilatoj** (Giorgio Silfer kaj Marco Picasso) kaj **Kinaro kaj Esperanto** (Judit Schiller), Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre)
- 03-13: **Internacia Tendaro SKOLTO '93**, Opava, Ĉeĥio (Jan Pišala, E. Krásnohorské 1, CS-74601 Opava, aŭ: Arie Bouman, Driesdreef 8, BE-9030 Gent, Belgio)
- 04-07: **2-aj Labortagoj pri Kulturo kaj Kunvivado de Kooperativo Saluton**, Lisbono, Portugalio (Saudação, Rua do Miradouro 12, PT-2735 Cacém)
- 05-18: **Lernu, praktiku, perfektigu**, Grésillon, Francio (Kultura E-Domo, adreso supre; gvidas Fernand Boyet kaj Georges Lagrange)

- 07-08: **80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj**, Kameoka, Japanio (JEI-Kongreso, Utamaru 1, Aratsuka-tyo, Kameoka-si, Kioto-hu, 621)
- 07-08: **Ekonomiaj aplikoj por Esperanto**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Alexandre Rousset)
- 07-13: **Somera Lernejo**, Stoke-on-Trent, Britio (Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs. ST12 9DG)
- 07-14: **49-a Internacia Junulara Kongreso**, Vraca, Bulgario (Esperanto, p.k. 26, BG-3000 Vraca; tel. +359/92/24890, faks. /24408; temo: "Ekonomio kaj socio en ŝanĝiĝo")
- 07-20: **Somera E-Lernejo kaj Internacia Lernejo por Funkciuloj de E-Organizajoj**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 08-21: **Eŭropo-Azio '93**, Moskvo-Perm-Jekaterinburg, Rusio (Ruslanda E-Asocio, pk. 67, RU-62007 Jekaterinburg)
- 10-14: **La E-disvolviĝo dum unu jarcento**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Claude Gacond)
- 10-14: **Survoje al ekologia moralo**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Lev Medvedev)



SKOLTO '93

3-13 aŭgusto, Ĉeĥio

- 12-17: **Pupfarado kaj kudrado**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Marie Hunninc)
- 14-15: **Natura kuracado**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Pierre-Marie Charrière)
- 14-21: **66-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**, Kazanlak, Bulgario (SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio)
- 19-22: **4-a Kultura E-Festivalo**, Kopenhago, Danlando (KEF 4, Jakob Nordfalk, Norre Alle 75, vaer 571, DK-2100 København)
- 19-24: **Literaturo**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Chris Declerck)
- 19-01: **Por la instruantoj**, Grésillon, Francio (Kultura E-domo, adreso supre)
- 21-28: **18-a Internacia Semajno de Esperanto**, Habères-Poche, Francio (Centre Culturel Esp. de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux, FR-34000 Montpellier; tel. +33/67-54-15-43)

- 22-28: **7-a Potsdama Somera E-ista Tendaro**, Germanio (Brandenburgia E-Asocio, Berliner Str. 49, DE-O-1560 Potsdam)
- 27-31: **63-a Itala E-Kongreso**, Pineto (D-ro Giorgio Bronzetti, Ispezione Prov. PT, IT-66013 Chieti Scalo)
- 27-01: **26-a Pupteatra Internacia Festivalo**, Zagrebo, Kroatio (IKS, HR-41000 Zagreb, p.k. 499; tel. 38/41/429-405, faks. /421-294)
- 28-29: **Edukado al pacaj rilatoj interkulturaj kaj interpopola konduto**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Mireille Grosjean)
- 29-10: **Silezia Ora Aŭtuno**, Kudowa Zdrój, Pollando (SEA, pk. 16, PL-50-952, Wrocław)

septembro

- 04-05: **44-a Kongreso de Bulgara E-Asocio**, Razgrad (BEA, bul. H. Botev 97, BG-1303 Sofia; tel. +359/2/310-029)
- 04-10: **4-a Internacia Turisma Semajno en Malto** (Malta E-Societo, P.O.B. 142, Valletta CNR 01)
- 04-11: **19-a Internacia Semajno de Esperanto**, Sète, Francio (Centre Culturel Esp. de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux, FR-34000 Montpellier; tel. +33/67-54-15-43)
- 04-11: **Internacia Ferio-Semajno en Meklenburgo/Antaŭpomerio**, kun elirpunkto Ueckermünde, Germanio (Erna Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel, Svislando)
- 05-12: **Aŭtuno '93**, Prago/Moravio, Ĉeĥio (Vladimír kaj Pavla Dvořák, Ostravská 637, CS-19900 Praha 9; tel./faks. +42/2/899-602)
- 10-14: **Mikologia seminario**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 14-20: **Aŭtuna Subtrata Semajno**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 15-22: **Internacia Konferenco "Esperanto kaj Turismo"**, Havano, Kubo (KEA, Pf. 5120, CU-10500 La Habana)
- 25-26: **La muzika flanko de la E-kulturo**, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Giorgio Silfer)
- 26-02: **18-a Internacia Foiro de E-turismo**, Bydgoszcz/Poznań, Pollando (Monda Turismo, adreso supre ĉe Esperantotur)

oktobro

- 09-12: **Kataluna Kongreso de Esperanto**, Alcúdia (Balearoj), Hispanio (Kataluna E-Asocio, Apartat 290, ES-08200 Sabadell; tel. +34/93/716-36-33, faks. /727-42-08)
- 09-16: **1-a Internacia Kultura kaj Turisma Semajno**, Sant Cugat del Vallès, Katalunio (HEFA, Pk. 15027, ES-08080 Barcelona, Hispanio)
- 09-22: **Aŭtuna E-Lernejo**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 14-17: **"Instrui komunike"**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre; praktika kurso de Stefan MacGill)
- 30-31: **Esperanto hodiaŭ, kaj plue?**, KCE, Svislando (adreso supre; la diskutforumon gvidas Andy Künzli)

49a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Vraca, Bulgario la 7an-14an de aŭgusto 1993

Antaŭ 30 jaroj en la pitoreska bulgara urbo Vraca okazis la 19a Internacia Junulara Kongreso. Per siaj 550 partoprenantoj, ĝi estis la plej impona por sia tempo. Kaj jen oni decidis denove okazigi Internacian Junularan Kongreson en Vraca.

Vraca estas la plej granda kaj grava urbo de nordokcidenta Bulgario kaj unu el la plej aktivaj Esperanto-centroj de tiu lando. En ĝi okazas kursoj, seminarioj, festivaloj, simpozioj, konkursoj; naskiĝas novaj libroj kaj kulturaj valoraĵoj. Ĉe la loka Pedagogia Instituto funkcias Fako Interlingvistika, kie oni preparas instruantojn de Esperanto kun ŝtata diplomo. La mondkonata Ŝtata Pupteatro de Vraca regule prezentas spektaklojn en Esperanto.

La kongresa temo, "Ekonomio kaj socio en ŝanĝiĝo", certe interesos plimulton de la kongresanoj. Iuj, precipe el orienteŭropaj landoj, scivolemas pri la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj en la eksaj socialismaj landoj, kia estas Bulgario.

Dum la kongresa semajno abundos kultura, distra, prelega, ekskursiva, sporta programeroj. Venos interesaj homoj. Vi

ĝuos amikan etoson... Kaj nepre vizitu la belegajn montarajn ĉirkaŭaĵojn de Vraca, kie eĉ eblos grimpi alpisme. Tamen, ni ne malkovru iujn sekretojn el la kongresa programo.

Se vi preferas pli profunde konatiĝi kun tiu lando, antaŭ ol forveturi al la antikvaj monaĥejoj aŭ al la bordo de la Nigra Maro, certe vi devas vidi la orajn kaj arĝentajn trezorojn de la traca epoko, el la kolekto de loka muzeo.

**Venu al Vraca, vi ne bedaŭros!
Bulgario varme akceptos vin!**



ijk



kotiztabelo de la 49a Internacia Junulara Kongreso en Vraca (Bulgario), la 7an-14an de aŭgusto 1993

La kotiztabelo estas en usonaj dolaroj.

	ĝis 93.01.31			ĝis 93.04.30			ĝis 93.06.30			poste		
	A	B	C	A	B	C	A	B	C	A	B	C
ĝis 18 j.	30	100	115	35	110	125	40	120	135	45	130	145
19-25 jaroj	35	110	125	40	120	135	45	130	145	50	140	155
26-30 jaroj	40	120	135	45	130	145	50	140	155	55	150	165
pli ol 30 j.	50	155	170	55	180	195	60	205	220	65	230	245

Kategorioj de aliĝo:

Kategorio A: Memzorgantoj nur el Bulgario; inkluzivas ĉiujn programerojn; ne inkluzivas nutradon kaj noktumadon.

Kategorio B: Inkluzivas ĉiujn programerojn, nutradon kaj noktumadon en amasloĝejo.

Kategorio C: Inkluzivas ĉiujn programerojn, nutradon kaj noktumadon en junulara hotelo.

Grave! La aliĝkotoj ne inkluzivas asekuron.

Kondiĉoj:

Kiel dato de aliĝo validas la dato de ricevo de la kompleta pago. Ĉiu aliĝo estos konfirmata.

La aliĝkoto ne transdoneblas al alia persono.

Oni ne repagas la aliĝkoton, nek se la aliĝinto pro sia propra volo aŭ iu ekstera kaŭzo ne partoprenos la kongreson, nek se la kongreso okazos aliloke aŭ alietempe, aŭ ne okazos.

Por karavanaj aliĝoj bonvolu kontrakti nur kun LKK!

La bulgaraj aliĝintoj en kategorio A ne ĝuas rabatojn.

La aliĝintoj el Albanio, Bulgario (en kategorioj B kaj C), Ĉeĥo-Slovakio, Hungario, landoj el eksa Jugoslavio, Pollando, Rumanio, landoj el eksa Sovetunio, Latin-Ameriko, Afriko, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) ĝuas rabaton je \$30.

La individuaj membroj de TEJO, la honoraj prezidantoj kaj membroj de TEJO kaj la patronoj de TEJO je la dato de aliĝo ĝuas rabaton je \$15, kondiĉe ke ne ĝuas la supremenciitan rabaron je \$30 kaj ne estas aliĝintoj en kategorio A.

Por bankelspezoj en Bulgario al la aliĝkoto bonvolu aldoni la bezonatan sumon (pri ĝi informiĝu ĉe via banko).

La aliĝkotojn ĝiru en usonaj dolaroj!

La bulgaroj pagas la kotizon en levoj laŭ la kotiztabelo kaj la valutkurzo je la dato de aliĝo.

La aliĝkotojn ĝiru al *First Private Bank, Bulgaria* -konto 950 325 963 300-4 - LKK de 49a IJK-Vraca. Pagante en la banko, nepre krompagu la bankelspezojn por Bulgario; aliokaze vi devos pagi tiujn surloke. Preferinde pagu per US\$, ĉar por la ŝanĝo el aliaj valutoj la bankoj ankaŭ postulas krompagon.

Eblas pagi la aliĝkoton al la UEA-konto *ijvr-h*, aldonante 5% por administrado de la sumo en CO.

La bulgaroj ĝiru la ekvivalenton de la aliĝkoto en levoj al *Първа частна банка - Враца* -сметка 963 111 492-3 - Организационен комитет на 49-ия Международен младежки есперантски конгрес.

Informiĝu ĉu en via lando estas kongresa peranto. Por Francio:

Vian aliĝon bonvolu sendi al la kongresa adreso. **JEFO**, 4bis, Rue de la
; Cerisaie, 75004 PARIS



ni plezure partoprenis! le plaisir de participer!



De la 15a ĝis la 28a de aŭgusto 92 mi veturis kun mia edzino per la trajno al POPRAD en Slovakio. Mi volis perfektigi kaj praktiki la lingvon. La akcepto en la domo de la Esperanto-Centro estis varma kaj frata. La esperantistoj el diversaj eŭropaj landoj prezentis sin al ni.

La morgaŭon, dimanĉo, kune kun la du kursgvidantoj kaj la gelernantoj, ni vizitis la malnovan kvartalon de "Spisska Sobota", kie situas la du domoj de la E^o-Centro. Kelkaj malnovaj domoj kovritaj de ligna tegmento viciĝas antaŭ agrabla parko. Ĉi-tie estas bone por ripozi sub la arboj. Ĉe la alia flanko de la parko ni vizitis la interesan muzeon de Historio kaj Natursciencoj.

Lundon, la "Somera Esperanto-Lernejo" malfermiĝis laŭ du kursoj. La kurso A per la "Metodo CSEH" por la komencantoj, la kurso B por la konversacio. En tiu kurso B ni diskutis pri tekstoj de esperantistaj verkistoj aŭ tradukitaj tekstoj. Ankaŭ la gramatikon ni relernis. La instruisto konigis al ni la esperantan kulturon: literaturo, poezio, kantoj... kaj la movado E^o, ĉio-ci en unu sola lingvo. Kompreneble la gvidanto klarigis la malfacilaĵojn de ĉiuj! La matena lernado daŭris de la 8a ĝis la 13a. La horaro estis simila dum la du semajnoj krom sabate kaj dimanĉe. Ni manĝis kune en la malgranda restoracio teretaĝe.

Posttagmeze ni estis liberaj. Kelkaj eblecoj proponis sin al ni. Ni banis nin en la ekstera urbo-naĝejo, kiu estis varmigita. Ĝi situas kun saŭno proksime denia kvartalo. Ni povis piediri aŭ veturi per oftaj aŭtobusoj al la urbocentro kaj al la stacidomo je 2 km. En la centro ni gavis antaŭ la montrofenestroj de la butikoj kaj vizitis la grandan magazinon. Proksime de la centro ni vizitis kune kun la esperantista gvidanto la muzeon pri etnografio, historio kaj arkeologio. Unufoje, en la preĝejo de Spisska Sobota, nia instruisto muzikis bone por la lernantoj per orgeno.

Post la kunsido de la kanto ni vespermanĝis je la 18a en la eta restoracio. Diversaj distraĵoj estis proponitaj vespere: skeĉoj, lumbildoj pri la flaŭro, la faŭno, pri la ursoj kaj pri la fungoj de la regiono. Nia kursgvidanto prezentis al ni diapozitivojn pri vojaĝoj en la lando de sia japana edzino kaj pri la tiea ĉiutaga vivo. Ankaŭ lumbildojn pri vojaĝo ĉe la gastigantoj de la "Pasporta servo" en Hungario li montris. Iun vesperon ni ĉirkaŭis fajron en ĝardeno de la domo por babili, kantadi, trinki kaj frandi rostitajn kolbasojn.

La duan semajnofinon ni ekskursis. Matene sabate ni piediris sur pado ĝis la stacidomo. Ni veturis per la elektra trajneto de la "Altaj Tatroj". Tiu montaro estas 28 km-ojn longa, tiel kruta kiel Alpoj. Gerlachovsky Stit (2655 m-ojn) estas la plej alta pinto. Dum unu horon kaj duono la eta trajno surgrimpas malrapide la deklivajojn tra la abia arbaro ĝis la finstacio de Strbské Pleso. Ni piede promenadis ĉirkaŭ

bela kaj pura lago. Post la pikniko ni seĝotelferis super la abioj ĝis la pinto, de kie ni ĝuis belan panoramon super la montaro, la lago, la skiejoj kaj for super la valo.

Per aŭtobuso ni veturis dimanĉe al "Slovakia Paradizo". Piedirado sur vojeto laŭ la rando de la torento ĝis gorĝoj, kie falis kaskadoj. Kiel belega estas la naturo ĉi-tie! Ankoraŭ mi kaj mia edzino ni vizitis la belan mezepokan urbon Levoca, kiun ĉirkaŭfermas remparoj, je 20 km-oj de Poprad, loko atingebla per trajno kaj aŭtobuso.

La lastan vesperon, okaze de honoriga kunveno, gelernantoj, instruistoj, kaj pasantaj esperantistoj festis la adiaŭojn. Ĉiuj gelernantoj, post sukcesa ekzameno, ricevis diplomon. Poste ni kantis en Esperanto kaj ĉiu en sia propra lingvo. Koncerne nin kaj geamikojn el Saint-Raphaël ni kantis "Sous les Ponts de Paris"... La Jugoslaviaj geamikoj el Kroatio, Serbio kaj Bosnio aŭdigis kantojn el Makedonio. La momento estis forta kaj mi pensis, ke la milito en Jugoslavio dividas la popolojn, dum ĉi-tie Esperanto proksimigas ilin. Tio estis belega kaj kortuŝa.

La sekvantan tagon ni disiris, kun la kapo plena je bonaj memoraĵoj kaj belegaj bildoj el tiu regiono. Niaj pakaĵoj enhavis la adresojn de niaj esperantistaj geamikoj. Mia edzino kaj mi konstatis, ke la lingvo funkcias bone... sed mi devas ankoraŭ lerni kaj lernadi ĝin!

Antaŭ forlasi Ĉeĥoslovakion ni ambaŭ vizitis la belegan urbon Prago, kiu meritas bonan etapon.

Pliaj informoj:

* **POPRAD** (20 000 logantoj) situas oriente de Slovakio, proksimume je 1500 km^oj de **METZ** kaj 580 de **PRAGO**.

* **La trajno veturas dum ĉirkaŭ 24 horoj ekde METZ:**

-rekta nokta trajno Parizo-Metz-Prago (ŝanĝo) poste rekta trajno Prago-Poprad Tatry-Kosice.

-aliaj trajnoj kun ŝanĝo ankaŭ en Frankfurto.

-ekde Strasburgo, sangoj en Offenburg, Stuttgart, Nurenbergo kaj Prago (depende de la trajnoj).

-ĉe la stacidomo de Poprad ekzistas taksioj kaj aŭtobusoj (n^o2, 3, 4 kaj 5 ĝis Spisska Sobota, kiuj haltas en la strato Sobotské Namestie).

* **Loĝado** en la asociaj domoj aŭ privataj loĝejoj en la kvartalo. Estas ankaŭ eble loĝi sub propraj tendoj.

* **La restado estas malmultekosta.**

* **Kursoj diversgradaj:** A B C D

* **Renkontejoj.**

* **Seminarioj.**


* **Turisma semajno en "Slovakia Paradizo":**

-Alpaj kaj Tatraj kabanoj en kampadejo kaj ekskursoj.

* **Programo ĉe:** ESPERANTO-CENTRO de S.E.A.
Sobotské Namestie 6,
058 01 **POPRAD**
Slovakio

Bruno HENRY (57-THONVILLE)

NI VIZITIS "EXPOLANGUES"...



Tiu "salono" okazis en PARIZO dum kelkaj tagoj (de la merkredo 20a ĝis la dimanĉo 24a de januaro 1993). Temas pri prezentado de multegaj iloj pri la instruado de lingvoj, de la paperaĵoj ĝis la lastaj komputilaj sistemoj!

Multe da budoj por emfazi la efikon de la prezentita metodo. Estis vivanta "Babel-turo"!!! Kompreneble la naciaj lingvoj okupis la plej vastajn spacojn, sed ankaŭ la regionaj kaptis grandan interesecon.

Kaj specifa, unika, sensimila aperis la internacia lingvo ESPERANTO...

Ĉe la stando, kelkaj gejunuloj, ridemaj kaj afablaj, akceptis la vizitantojn, klarigis pri kio temas, disdonis broŝurojn, proponis logplingletojn, ĉemizetojn. Granda ekrano konektita al la "minitelo 3615 ESPERANTO", ebligis, lude, informi la gejunulojn, kiuj multaj diskutis kun la lokaj esperantistoj. Mi gratulas la membrojn de JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo), kiuj starigis kaj vivigis tiun standon kun granda kompetenteco. Ankaŭ al UFE ni devas danki, kiu pagis la multekostan lokon.

De ĉiuj vidaĵoj mi povas doni la jenajn kelkajn konkludojn personajn (mi rimarkigas al la legantoj, ke mi ne estas instruisto, do ne spertulo sur tiu kampo).

Ŝajnas, ke la lernado de lingvoj ne koncernas amason da homoj, ĉar temas pri malfacila afero: libroj kaj metodoj estas luksaj kaj komplikaj, eĉ se la prezento aspektas same kiel ludoj. La komputilaj sistemoj estas multekostaj kaj petas vastan konon kaj profundan volon al lernado. Oni povas imagi, ke kelkaj profesiuloj, kiuj necese, pro profesia kaŭzo, devas paroli fremdan lingvon, devigas sin uzi tiujn instrumentojn, t.e. parolante kaj tajpante multfoje la saman frazon, dum multe da horoj! Sed laŭ mi ne temas pri amaso da homoj.

Tamen, kia estas la defio, se ne ebligi al la multo de Eŭropanoj komuniki inter si, simple kaj profunde!

Mi devas konfesi, ke hodiaŭ mi ne konas alian eblecon ol la Internacian Lingvon ESPERANTO.



François-Xavier GILBERT
55 - BAR-le-DUC

KUNVOKO

La Ĝenerala Asembleo de nia Federacio okazos la
Dimanĉon, 13an de junio 1993, je la 10a horo

en salono de la "M.J.C. Ph. Desforges", 27 Rue de la République
54000 NANCY

En diversaj gravaj medioj konstatiĝas ia kreskiĝo de intereso al Esperanto. Ni nepre kaptu tiun favoran sintenon! Dum la tagordo de tiu jara A.Ĝ. estos debatataj ne nur la punktoj de la ordinaraj protokolaĵoj sed ankaŭ la specifaj eroj de nia futura agado. Ju pli da alportotaj kontribuadoj, des pli da bonaj ideoj por akceli la agnoskon de nia interkomunikado-solvo. Ni kalkulas pri la partopreno de multaj federacianoj!

Estas antaŭvidita komuna tagmanĝo en la proksima mem-serva restoracio "FLUNCH"

Ĉe niaj "najbaroj" chez nos "voisins"



Jen la fino de la interesoplena kaj pensiga raporto pri la afrikaj spertoj de nia germana samideano **Annsybill KAMPHAUSEN**.

"... Ĉiu el ni, mi tute certas, ĉiam elkore donas aŭ donos. Pluraj satas doni libervole, pluraj malcertas. La mizero en Afriko ofte igas nin senhelpaj: ĉu estas sencoplena helpi? Kie komenci? Ĉu fidindas nia amiko? Gazetaraj informoj plue iritas nin.

Plendoj neniam helpas, do, kiel trakti petojn? Kiel gvidlinio, apologio: la ideo de Esperanto estas trovi justan solvon de lingvaj problemoj mondscale, kaj kultura interŝanĝo mondscale. Ne solvo de ekonomiaj problemoj ie ajn. Ĉiam disigu malsamajn aferojn, neniam miksu ilin, nur tiam vi liberigas kaj ag-kapablas! Leteroj inter vi kaj via afrika amiko plej gravas -senfina, larĝa, firma bendo de **amikeco, kompreno, solidareco**- tiel forta por toleri kaj elteni ciajn problemojn. Akceptu ĉian demandon kaj traktu ĝin racie.

Koro kaj racio ne kuŝas apude... sed ambaŭ agu. Kiam vi ricevas leteron de via amiko vi ĝojas, via koro malfermas sin. Se la letero enhavas problemon, peton, via racio rapide prezentos sin. Do, forprenu el la letero la peton. Via racio nun okupiĝas pri la problemo, via koro restas ĉe la letero.

Neniam agu kontraŭ via konvinko, via korespondado suferus. Ne agu pro kompato, kompato maldignas, malbona bazo por amikeco. Sed ĉiam esprimu vian konsenton, se vi ne povas helpi. Ofte via korespondanto ne scias pri ebloj de eŭropaj amikoj, klarigu tion al li. Se vi malcertas pri petoj, problemoj, demandu iun, kiu okupiĝas pri Afriko.

Homoj en la tuta mondo havas samajn sentojn: amo, malamo, ĝojo, malĝojo, deziroj... sed la maniero esprimi tiujn sentojn povas esti tre, tre diversa. Kutimojn afrikajn, pensmanieron alian Gbeglo Koffi montras en tiu verketo plena je afrika atmosfero. Mi tre ŝatis legi pri vilaĝano, kiu vizitas bonstatan filon en urbego, pri subordigo de junulo sub maljunulo, grava rolo de respektindulo, pri postuloj: ĉion la patro postulas, nenion la filo rifuzas. Koffi bone komprenas fenomenojn, kiuj rol-ludas inter Afrikanoj kaj Eŭropanoj. Tre amuza kaj tre prudenta romaneto. Legu ĝin, prenu ĉion laŭvorte, Afriko estas alie.

Kaŭzis mi malkomprenon, miskomprenon en Afriko: "O, mankas ŝtonoj en mia awalé-ludo", mi diris. Posttage, iu donacis malgrandan saketon kun tiaj ŝtonoj, kernoj. "Ĉu mi forlasu vian landon sen suveniro?" mi, serĉante, diris al butikisto en bazaro abidĵana, kiu insistis pri alta prezo. Ses afrikaj amikoj rigidiĝis, flustris kaj diris: "O, ni ne volas, ke vi forlasu nian landon sen suveniro. Ĉu ni rajtas donaci la ŝtonojn al vi?" Mi rifuzis, sed, post unu horo ĉiu el ni estis ornamita per bela koliero. Mia eŭropeca konduto devigis bonegajn amikojn donaci ion al mi, ĝis nun ili ne komprenis miajn vortojn, ĉar vortoj havas alian gravecon en Afriko. do, de tempo al tempo, mi ne komprenas ilin kaj ili ne komprenas min. Malgraŭ tio nia amikeco daŭras, por ĉiam ni esperas.

Leteroj el afriko, al afriko, tiu forta bendo de amikeco, toleremo, sencero, kaj intensiva, viva klub-vivo estas la bazo, la fundamento de Esperanto en Afriko. De multaj jaroj interŝanĝas leterojn kun afrikaj esperantistoj ubuopuloj kaj kluboj. Pluraj vizitis ilin. de tago al tago kreskas la nombro de kluboj. Al ili mankas okazoj uzi nian lingvon, spertiĝi letere, sperti solidarecon de homoj, kiuj vivas en favora monda parto., kun homoj, kiuj vivas en malfavora parto, ankaŭ kiel esperantistoj. **Skribu! Daŭrigu... mi petas!**

Ĉu oni povas fari plu? Jes, denove mi petas. Se vi volas kaj povas, helpu al izolitaj esperantistoj kaj, pli efike, akcelu klubojn. Ĝemeligu vian klubon kun afrika. Starigu, subtenu kluban bibliotekon. Sendu libretojn por progresantoj. Abonigu gazeton. Donacu al via amiko aŭ afrika klubo membrecon en U.E.A.... Imagu ĝojon pri konkreta apartenaĵo, pri ĉiumonata ricevo de gazeto!

Eksterlandanoj kolektis monon por malgrandaj esperantaj evolu-help-projektoj kiel fiŝbredado, ĝardenkulturo, en Senegalio, Togolandop, Madagaskaro... Kolektu por pliaj eble kun ne-esperantistoj...

Kiam vi renovigas ĉiujaran membrecon en UEA, kontribuu per ia sumo al fondaĵo Afriko, subtenante klubojn, asociojn. Vojagu Afriken, ĉeestu 3an Afrikan Kongreson de Esperanto en ACCRA, Gano, en 1993, spertigu la efikecon de Esperanto inter Afrikanoj kaj eksterlandanoj. Sentigu, ke Esperanto estas filo ne de logika spirito, sed de agema sento!

Ni scias, ke Afriko, tiu granda kontinento, suferas. Mi spertis Afrikon kiel tre helan, vigan, buntan kontinenton, kie homoj, senespere, serĉas laboron. Mi spertis Afrikon kiel tre fortan, junan kontinenton kun granda estonteco, malgraŭ la ĵus aperintaj ciferoj, ke la ekonomiaj diferencoj inter la riĉaj landoj kaj Afriko pli kaj pli kreskas. Mi spertis malriĉecon de miaj amikoj de tre proksime, kiam ili diskrete kaj taktoplene malaperis antaŭ modesta restoracio, por ne devigi nin inviti ilin. Mi spertis malriĉecon, kiam mi vidis, post kelkaj kongres-tagoj, malgrandajn ventrojn ĉe pluraj.

Mi sentis fortan, firman kredon al idealoj, kredon al la celo de Esperanto, kredon, kiun mi ne tre ofte trovas en mia lando.

La kongreso finiĝis en COTONOU, la sekvan tagon. Sidante ĉe tablo, du junuloj alvenis, tre magraj, tre trankvilaj, tre dignaj. Ili estis foririntaj de DAKAR en Senegalio, trajne, enbusiĝis en BAMAKO, en Malio. Survoje la buso plurfoje kolapsis, ili ŝovis ĝin. Miloĵ da kilometroj, plenan semajnon ili survojis, tre malfrue, preskaŭ tro malfrue ili atingis sian celon: **senti internacian amikecon, senti esperantan etoson...**

Unu sidis apud mi, silenta, kvietita. "Mi verkis kanton, subite li diris, kiam ni ŝovis la buson. Ĉu vi deziras aŭdi ĝin?". Li kantis, ni kantis, aliaj kantis.

Ĉiam ni kantis ĝin en Afriko. Estis nia kanto. Nia kanto de solidareco... de unueco.



Equipe Cousteau

233, rue du Faubourg Saint Honoré 75405 Paris Cedex 08
Téléphone : (1) 40 53 63 00 Télécopie : (1) 40 53 63 03 Télex : 641 856 F Requins

Monsieur Jean-Paul COLNOT
15 rue de Lavaux
54520 LAXOU

EC/DC

Paris, le 3 mars 1993

Monsieur,

Nous avons bien reçu votre courrier et vous remercions de votre franchise et de vos commentaires.

La lettre que vous évoquez, et que j'avais adressée le 4 Décembre dernier à l'une de nos correspondantes adhérentes, avait été suivie dès le 23 Décembre d'un second courrier à cette même personne, reprenant ce qui suit. Cette seconde lettre n'a malheureusement pas reçu la même diffusion, bien qu'elle était de nature, semble-t-il, à apaiser le débat. Depuis cette époque, de nombreuses lettres nous ont été suscitées sur ce sujet...

Nous reconnaissons volontiers que nous ne sommes guère qualifiés en matière linguistique, notre domaine de compétence et d'activité relevant, et c'est déjà beaucoup, de l'écologie au sens le plus large.

Vos arguments et les documents que nous avons reçus de personnes qui, comme vous, cherchent à propager l'espéranto, nous ont permis de mieux connaître les différents aspects de cette langue. Nous serons nous-mêmes évidemment heureux d'utiliser cet outil de communication dès lors qu'il sera couramment employé par les très nombreux organismes et personnes auxquels nous avons affaire. Nous sommes tout-à-fait convaincus, comme vous l'écrivez, qu'une langue universelle faciliterait grandement la compréhension entre les hommes et la prise en compte des grands problèmes posés par la préservation de notre habitat commun, la Terre.

Nous pensons en particulier que l'Espéranto pourrait efficacement contribuer à la diffusion de notre pétition pour les Droits des Générations Futures, et avons fait des propositions dans ce sens. Ce serait pour nous l'occasion d'évoquer cette coopération dans le CALYPSO LOG.

Bien cordialement,

Didier CERCEAU
Chargé de Mission

===== NIAJ DONACINTOJ EN 1992 =====

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1992:

Donacoj por la Federacio: S-ro CONCESSI 30 FF - S-ino GRAMPP 30 FF - S-ro GUEGUENIAT 30 FF - S-ino JEANMAIRE 30 FF - S-ino ROMAIN 130 FF - Diversaj 15 F
Sume 265 FF

Donacoj por "La Informilo:"

S-ro BLANCHET 30 F - S-ro CANIN 30 FF - S-ino MASSARD 55 FF
Sume 115 FF

FINANCA RAPORTO ORIENTA FEDERACIO 1992 - DATO: 23.02.1993

ENSPEZOJ FEDERACIO

130 Federaciaj membroj	3250.00
60 UFE-membroj kun pago	1165.00
7 Donacoj al Federacio	265.00
7 Perado kotizo abonoj	1185.00
2 Rentumo kaj sikavoj	3976.49
1 Vendo de sikavoj	18161.20
9 Vendo de materialo	670.00
1 Prunto de libroservo	-1000.00
1 Etikedoj por UFE	92.40
1 Profito staĝoj	733.50

	28498.59

ELSPEZOJ FEDERACIO

13 Sekretariaĵoj	1392.80
1 Propagando	1140.00
4 Perado de kotizoj	1185.00
1 Riparo de ekspozicio	287.00
3 Aĉeto de sikavoj	35647.05
8 Aĉeto de materialo	633.00
1 Federacia premio	185.00
1 Diversaĵoj	100.00
1 Prunto al libroservo	-1000.00

	39569.85

=====

ENSPEZOJ "INFORMILO"

227 Abonoj al Informilo	10439.00
3 Donacoj al Informilo	115.00
1 Reklamo por libro	50.00

	10604.00

ELSPEZOJ "INFORMILO"

4 Eldono Inf.77 380 ek	1624.60
4 Eldono Inf.78 350 ek	1344.00
2 Eldono Dok.78 320 ek	227.00
3 Eldono Inf.79 320 ek	1176.80
4 Eldono Inf.80 380 ek	2562.00
5 Enlanda sendado Inf.	709.87
5 Eksterland.sendkosto	1239.00
8 Materialo por Inf.	628.43

	9511.70

=====

ENSPEZOJ FEDERACIO	28498.59
ELSPEZOJ FEDERACIO	39569.85

<u>PROFITO FEDERACIO</u>	-11071.26

ENSPEZOJ "INFORMILO"	10604.00
ELSPEZOJ "INFORMILO"	9511.70

<u>PROFITO "INFORMILO"</u>	1092.30

Havo je la 31 12 91	28101.46
PROFITO FEDERACIO	-11071.26
PROFITO "INFORMILO"	1092.30

<u>Havo je la 31 12 92</u>	18122.50

La trezoristo :
A. Grossmann

Bona financa situacio ebligis investi en Sikavoj Latitudo kaj oferti al nia abonantaro ampleksan jarfinan numeron. Sed ĉi-tion ni ĉefe ŝuldas al la diligenteco de nia redaktoro al kiu ni estu dankema.

Nia financa situacio donas al ni la eblecon ampleksigi nian propagandadon. Tial ne hezitu partopreni, per starigo de Esperanto-budo, foirojn, forumojn aŭ aliajn publikajn manifestaciojn. Nia federacio estas preta vin finance subteni.

===== ATENTON!... LASTA NUMERO! =====

Jes, se vi ne pagos vian abonon por La Informilo, ĉi-tiu numero 81 estas la lasta sendita al vi.

Kiel scii, ĉu vi jam pagis vian abonon?? Tio estas tre facila: Sur la adres-etikedo de via Informilo, la unua linio konsistas el la adreso-kodo kaj poste la abono-jaro. Se tiu abono-jaro estas 93, tiam vi estas jam paginta vian abonon por 1993. Gratulojn! Post la abono-jaro troviĝas mencioj pri viaj pagoj por la koncerna jaro, *Afabonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.*

Se la abono-jaro estas 92, tiam aperas poste la mesaĝo Lasta Numero !!, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon por 1993. Bonvolu tion fari senprokraste, se ne, vi donos al nia kasisto la malagrablan taskon, sendi al vi en majo aŭ junio alvok-leteron, kiun vi verŝajne ne ŝatus ricevi, kaj kies afranko estas plia elspezo por la Federacio. Krome vi riskas ne regule ricevi La Informilon.

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj	45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	15 Rpk aŭ 57 FF
Federacia kotizo	26 FF
Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando	20 FF

Vi povas pagi:

Al nia poŝtĉekkonto:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO 1997 72W NANCY

Aŭ al nia kasisto:
S-ro André GROSSMANN,
5, rue des Pyrénées,
68390 BALDERSHEIM.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (*departementoj 54 55 57 67 68 88*) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, bonvolu aparte pagi vian federacian kotizon je 26 FF por iĝi aŭ resti federacia membro.

Aparte mi dankas al la abono-pagintoj, kiuj samtempe sendis al mi siajn afablajn bondezirojn por la nova jaro. Al ili mi reciproke deziras plej feliĉan nova jaron, kun prospera partopreno en la diversaj Esperanto-aranĝoj.

A. Grossmann

===== ATTENTION!... DERNIER NUMERO! =====

Oui, si vous ne payé pas votre abonnement à La Informilo, ce numero 81 aura été le dernier à vous parvenir.

La ligne qui précède votre adresse vous permet de savoir si votre abonnement pour 1993 a déjà été payé. Si vous y avez trouvé le message "Lasta Numero" votre abonnement n'a pas encore été enregistré lors de l'impression des étiquettes. Nous vous invitons à le régler sans tarder afin d'éviter tout retard dans l'envoi de notre bulletin. D'autre part vous éviterez à notre trésorier la désagréable mission de vous envoyer une lettre de rappel courant mai/juin. Lettre, que vous n'aimerez certainement pas recevoir, et dont l'affranchissement constitue une dépense supplémentaire pour notre fédération.


Abonnement à La Informilo pour les adresses en France	45 FF
Abonnement à La Informilo pour les adresses à l'étranger	57 FF
Cotisation fédérale	26 FF

Vous pouvez payer:

A notre CCP:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO 1997 72W NANCY

Ou à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN,
5, rue des Pyrénées,
68390 BALDERSHEIM.

A. Grossmann



- Jes! Vere efikis grava peticio de la legantaro al la anĝel-estro..."



KRUC-VORT-ENIGMO KUN KAŜITA PROVERBO =====

HORIZONTALA = A Plirapidigas - restu vertikale sur la piedoj. B Infanece kredema - terloĝant'. C Infloreska flor' - eligadu flareblajn korperojn. Ĉ Aŭtosimbolo de Francio kaj Panamo - ne transpasanta limojn de iu loko - brusta elstaraĵ'. D Kreskaj'el kiu oni produktas tolon - frakcioj - alta ludkarto. E Aŭdorgana - monkestan. F Fiŝkaptistan grandmaŝan teksaĵon - fortege dezirante. G Rilata al honora respekto - aparat' por malkovri malproksimajn aviadilojn aŭ ŝipojn. Ĝ Falas neĝo - grupiĝo, kolektiĝo. H Spiritita atmosfero de iu medio - opon de ses personoj. Ĥ Ekzistis - kun amika inklino. I Ĉiela astro - libroforme. J Rilata al trinkvazo - posedata de aliu. J Alpaŝo - suprentirata per ŝnuro / sen finaĵo, pri flago/. K Muzikaĵoj ludataj de unu artisto - rilata al Atoso. L Kaj tiel plu - sentis fortan korinklinon - numeralo. M Denova, ripeta - nacilingve en multaj lingvoj: "patrino" - angla virnomo. N Fabelaj gigantoj - fama reĝo de la Hunoj. O Vortero en substancnomoj / nitrogenhava grupo NO₂/ - trafon, ĵeton de pilko en celon. P Grasaj likvaĵoj - Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko.

VERTIKALE - 1 La unua parto de la proverbo. 2 Serpentmaniere moviĝi - denova met' - loĝejo por brutoj - ko vril'. 3 Havantan dorsan elstaraĵon - la tuto de samnivelaj ejoj en domo / tavolo / - nomo de artefarita teksaĵfibro - ne tute, ne plene. 4 Nukso de avelujo - daŭre restadas, okupas loĝejon - instrumentaro - romia dio de amo. 5 Eleganta ĉambr' por gastoj - korta birdo - aromaj likvaĵoj el sojfaboj, uzataj kiel saŭco aŭ spicaĵo en Japanio kaj Ĉinio - monatoj. 6 Varkvanto, estanta dispone - estas kara - rilata al Alaho - prezentu al vi en la spirito. 7 Ĝenaj pro troa daŭro kaj malinterese - monavide - granda batal' per armiloj - ne sentos malsaton. 8 Rilata al delikata odoro - estis sur seĝo - cikonioforma birdo - karakteriza maniero. 9 Altvaloras pro malofteco - malrapide ludata muzikpeco - verkas - dion de la ventoj. 10 La dua parto de la proverbo.

HELPILOJ: C Umbel. 8 Ibis. 9 Eolon. (verkis Marček-Markovič)

"SILAB"-ENIGMO KUN KAŜITA PROVERBO

Helpe de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difinoj troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale l gataj, elformos proverbon.

al be bro buo cer di do do dro ee ek el es go ho in jo kir kla klu ko la li lo ma mo ne ni no no no ob ok ok ok po psu ra re re ro sli so ta to tri tro vi vo

1	+ - - + -	klasebla folieto
2	+ - - + - - -	ia enŝovo
3	+ - - + - - -	parencino
4	+ - - + -	sovaĝa remaĉanto
5	+ - - + - - -	projekci-akcesoraĵo
6	+ - - + - - -	komerca alvoko
7	+ - - + - - -	publikigi verkon
8	+ - - + - - -	frukto
9	+ - - + - - -	priatenta al ordono
10	+ - - + - - -	ekscitilo
11	+ - - + - - - - -	sidejo de firmo
12	+ - - + - - - - -	misparolo
13	+ - - + - - - - -	trinkaĵo el distilo
14	+ - - + - - - - -	rondoturni fluidaĵon
15	+ - - + - - - - -	monato
16	+ - - + - - - - -	salajro, pago
17	+ - - + - - - - -	pigmento-tero

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

ARKO-KRUC-ENIGMO: "rapide akiris, rapide perdis"

SILAB-ENIGMO: ĉiu medalo du flankojn posedas

Ĉu nia finjara konkurso estis tro cerbumiga? Fakte nur 3 legantoj sendis sian korektan solvon. Ni speciale gratulas Ginette MARTIN, kiu desegnis superban geometriaĵon... ("Mi ne deziris tranĉi la ŝatatan ĵurnalon...").

Ĉar S-r^o ROUX rezignis pri ricevo de premio, estos rekompensitaj pri libro G. Martin kaj E. Barrier.

Imprimé par les soins de l'Office Central de Coopération à l'Ecole (OCCE) - 1, Rue Fr. de Guise, 55000, BAR-le-DUC. - Le Dir. de la public.: J.-P. COLNOT - Le